

SACERDOTA POPOLO, LA SACERDOTEKO DE IZRAELO

“Unu homo malsupreniris de Jerusalemo al Jeriĥo; kaj li falis en la manojn de rabistoj, kiuj lin senvestigis kaj batis, kaj foriris, lasante lin duone senviva. Kaj laŭ okazo unu pastro malsupreniris la saman vojon; kaj lin vidinte, li preterpasis aliflanke. Kaj tiel same unu Levido, veninte al la loko kaj lin vidinte, preterpasis aliflanke. Sed unu Samariano, vojaĝante, alvenis tien, kie li estis, kaj lin ekvidinte, li kortuŝiĝis...” (Lk. 10,30-33).

Tiuj ĉi vortoj el la Evangelio laŭ Sankta Luko, eltiritaj el unu de la parabolaj rakontoj kiuj pli karakterizas sian verkaĵon, ĝuste ili malhele prilumas la alfrontindan temon. Temas pri malhela lumo ĵetita ne tiom sur la homoj komisiitaj por la kultado en la templo de Jeruzalemo, kiel estas por la pastro kaj por la Levido pri kiuj parolas la surdiritan tekston, sed temas pri malhela lumo ĵetita sur la tuta sacerdota juda kasto kies skrupula observemo de la reguloj pri la leĝa pureco rajtigis nehomajn sintenojn. Laŭ la rakontfado de la parabolo, se la rabistoj lasis la mizerulon duone senviva, la pastro kaj la Levido ne helpante lin donis la mortigantan baton. Per malmultaj vortoj kaj laŭ nereakta maniero, Sankta Luko elmontras kio sin kaŝas malantaŭ la pompo de la sanktaj liturgiaĵoj en la templo: temas pri la tuta malzorgemo rilate la vivon kaj la bonon de la homaj estaĵoj.

Tiu ĉi konstato pri la realo de la izraela sacerdoteko kune kun la deklaro kiun Jesuo faros pri la templo de Jeruzalemo kiel “kaverno de rabistoj”(Lk. 19, 46) kie la pastroj estas komparataj kun rabistoj, kiuj kaŝas en la templo de Dio siajn ŝtelitaĵojn, tuj klarigas kial ĉio kiokoncernas la judan kulton estas praktike ignorata de la evangeliistoj.

La greka termino **leitourgi,a** kaj ties devenaĵoj (liturgia, liturgiisto, fari liturgiaĵon) per kiuj en la traduko de la LXX oni indikas la servon kiu la sacerdotoj faris en la templo, ĝuste tiuj neniam aperas en la Evangelioj, krom en ununura okazo, en la Evangelio laŭ Sankta Luko 1,23, kaj en tute negativa kunteksto: la nekredemo de la sacerdoto Zeĥarja kaj lia nekapablo pliparoli. Sankta Luko malkovras la senkonsiston de kulto kies pastroj povas fari ilian laboron eĉ se ili estas nekredemaj kaj mutaj, kiel Zeĥarja kiu spite de la okazintaĵo li daŭrigos sian “liturgian servon en la sanktejo, fininte sian vicon kaj poste reirinte hejmen.

Malgraŭ la graveco de la sacerdota servo por la disvolvo de la kulto en la templo de Jeruzalemo, la sacerdotoj estas apenaŭ menciitaj en la Evangelioj. Nur Sankta Luko mencias ilin kvin fojojn (Lk.1,5;5,14; 6,4; 10,31; 17,14), dum Sankta Marko kaj Sankta Mateo supraĵe citas ilin en la epizodo pri la purigado de la leprulo (Mk.1,44; Mt.8,4) kaj dum la diskuto kun la fariseoj pri la observemo de la sabata festo (Mk.2,26; Mt. 12,4.5). Sankta Johano rememoras ilin nur unufoje,

en la pridemandado al la Baptisto (Joh. 1,19). Male, oni pli citas la Ĉefsacerdotojn, kiujn oni ĉiam prezentas en konflikta etoso kun la Kristo.

Tiu ĉi negativa vidpunkto pri la juda sacerdoteco, transdonita al ni de la evangeliistoj, havas siajn respondojn ankaŭ en la tiuepokaj verkoj. La historiisto Jozefo Flavjo asertas, priskribante la tensiojn ekzistantaj ene de la sacerdota kasto: "Ekzistis reciproka malamikeco kaj interklasa batalo inter la ĉefsacerdotoj unuflanke, kaj la sacerdotoj el Jeruzalemo aliflanke. Kaj kiam ili interbatalis inter si ili uzis ofendan lingvaĵon kaj sin batis reciproke per ŝtonoj" (. Judaj antikvaĵoj, 20, 180).

"(la ĉefsacerdotoj) ne ekzitis sendi siajn servistojn en la farmkorto kie troviĝis la draŝita greno por forporti la dekonaĵojn ŝulditaj al sacerdotoj, tiel akirante la rezulton ke la plej mizeraj sacerdotoj mortis pro malsato" (. Judaj antikvaĵoj 20, 181).

La konfliktoj markis la fendiĝojn de religia sistemo kiu baziĝis absolute nur sur la sanktofera kulto, kiu ĉiam pli malfacile sin vivtenis kaj kiu tute falos pro la krizo en la jaro 70a P.K., kiam la templo estos detruita fare de la armeo de la Imperiestro Tito. La unuajn antaŭsignojn de la disfalo oni jam preskaŭ percetis en la jaro 160a A.K. dum la krizo de la Makabeoj, kiam grupo da piaj observemuloj arde sin oponis al pretendoj de la Hasmoneoj¹ koncentri en la persono de la princo ankaŭ la taskon de la ĉefsacerdoteco; ekde nun la kulto de la templo estos konsiderata senrajta de tiuj oponentoj, kiuj sin kaŝos en la dezerto por starigi la komunumo de la puruloj²

1. La neakordigebla bildo de la izraela sacerdoteco

La sacerdoteco de Izraelo estis esprimo de religia pompo kiu ofte ne konsideris la realajn vivkondiĉojn en kiuj troviĝis la popolamaso; la skrupula fideleco de la sacerdotoj al ritario kaj al reguloj pri pureco al tiu kunligitaj, krome, aperas ege kontraŭaj al la spontana kaj freŝa spiritualeco kiu, ekzemple, karakterizis la rolon de la profetoj La aparta malsimileco inter la profeto kaj la sacerdoto estas ke la unua respondas al avoko aŭ vokiĝo, dum la dua estas destinita al tasko surbaze de lia aparteno al la sacerdota kasto. En tiu medio oni jam naskiĝas sacerdoto sed profeto oni fariĝas. Aliflanke la malmulteco de datumoj pri la sacerdota institucio, kiujn ofertas la Malnova Testamento foje malakordas inter si, kaj ĉar ili estas la ĉefa fonto al kiu oni povas sin turni ili kondukas al nekongruaj konkludoj la fakulojn.

La problemo koncernas la taskon mem de la sacerdota kasto en la izraela tradicio. Precipe post la babilona ekzilo la izraela tradicio ŝainas ege leĝisma, restriktita kaj eĉ servisteca; tamen oni devas taksu ĝian rolon el la vidpunkto de la tiutempa religia sistemo. La pastroj sin prezentas kiel **funciuloj pri sanktaĵoj**, nenion oni allasis al la improvizado, sed ĉio estis fiksita laŭ detalema regularo. La sacerdotoj de Jeruzalemo formis enfermitan kaston kiu ĵaluzis pri propraj privilegioj kaj rajtoj kaj defendis sian intereson rilate al dekonaĵoj kaj al atribuo de pecoj da buĉitaj bestoj, kiel atestas la historiaj fontoj mem en tiu tempo: Kiel ununuraj oficistoj rajtigitaj celebri la ritojn de la publika kulto, el kiuj devenis la koheron kaj la protekton de la juda socio, la sacerdotoj estis eĉ nemalaveblaj por la politika organizo de la nacio.

2 La sacerdota kulto

¹ Per la detroniĝo de la lasta laŭleĝa Ĉefsacerdoto, Onija la III, en la jaro 175a A.K. komencas krizepoko por la juda religia institucio. En la jaro 152a A.K. Jonata la Makabeo akiris la taskon de Ĉefsacerdoto fare de la Seleŭkiuloj, altirinte tiamaniere sur si mem la malamikecon de la plej piaj grupoj da ortodoksuloj, inter kiuj estis tiu de la Esenoj kiuj taksos Jonan kiel bildon de "La Malpia Sacerdoto" kaj liajn subtenantojn kiel "filoj de la mallumo"

² "Dum la jardeko inter la jaro 170a kaj 160a A.K.... la laŭleĝa sacerdotaro ekkonsciis ke ĝi ne plu havas sekvantojn inter la homamaso kaj eĉ ne inter la potenculoj... dum aliaj Sadukeoj, verŝajne jam en malamikeco kun la templo, pro motivoj ne konataj al ni, ĝuste ili preferis retiriĝi en la dezerto..."

En Izraelo, ĝis la detruado de la templo (70a P.K.) la sacerdoto dependis de la sanktofera kulto ĉar ĝi estis la plej grava fonto de lia vivtenado. Ĉar li respondecis pri la ĉiutaga oferceremonio, kaj ankaŭ pri tiuj festaj kaj privataj, al la sacerdoto oni donacis parton el la oferdonadoj okazintaj en la sanktejo; neniu povis senigi lin je la rajto manĝi la sanktan manĝaĵon de la sanktoferoj. Pro ilia tasko de funkciuloj pri sanktaĵoj la sacerdotoj ŝajnis esti pli profesiaj buĉistoj ol virtaj homoj en la preĝado³.

Proporasence la kulto estis la sanktofera kulto de la Ĉefsacerdoto kiu diservis dum la gravaj solenaĵoj, aparte en la Penta Pekliberiga Tago (en la hebrea lingvo “*Yom Kippur*” Nur unu fojon jare, okaze de tiu ĉi solenaĵo, la Ĉefsacerdoto povis eniri en la plej sankta parto de la Templo, nome en la plej sankta ĉambro de la sanktejo, kie li faris la aspergon per la sango de la oferviktimo pro la pekliberiĝo de la tuta popolo, temis pri tre komplika rito kiel indikas Lev.16. La ĉefa parto de tiu ĉi ritaĵo, la plej impona el la tuta liturgio, ne estis la Ĉefsacerdoto kun la tuta sia sankteco, sed estis la buĉita besto kiu estis oferdonita dum la buĉado kaj kies sango devis purigi la popolon de liaj pekoj. En la loko la plej sankta en la tuta terglobo, nome en tiu de la dia domo, kio restis en la interno estis la sango de la viktimo oferdonata dum la buĉado.

La buĉadoj okazis en malfermita loko, sur la altaro konstruita en la korto, antaŭ la enirejo de la sanktejo. En la templo de Jeruzalemo la dispartigo de la spcoj de la sanktejo mem rememoris tiun de la palestinaj domoj, kie oni ĉiam kuiris en la korto, tiel ke ankaŭ Yahvè havis sian “kuirejon” kaj la necesan personaron por plenumi la rilatajn taskojn. Laŭ la tiuepokaj judaj atestoj neniu vizitanto de la templo, aŭ eĉ la ĉeestantoj en la kulto naŭziĝis pro tiu buĉeja etoso :

« Komercistoj kiuj vendis bestojn taŭgajn al oferdonado kaj laŭritajn, purajn ujojn por la sanktaj manĝoj, monŝanĝistoj, buĉistoj, kuiristoj kaj aliaj helpantoj trairis la eksterajn kortojn de la Templo kaj ĝin ŝajnigis kvazaŭ orientan bazaron. Neniu trovis kritikindan ĉi tiun komercon, ĉar ĉiu renoma sanktejo. Kaj en Kaj en ĝrekujo kaj en Oriento estis ankaŭ komerca centro. Ĉiu templo estis samtempe buĉejo kaj manĝejo, tiu estis neseparebla kondiĉo el la sanktofera sistemo. »

La nombro de la sacerdotoj estis tiom alta ke oni fiksas rotacian sistemon por la liturgiaj diservoj ĉe la templo. (en la epoko de la Nova Testamento oni kalkulas ke la sacerdotoj estis cirkaŭ 18000) La sacerdota kasto estis dividita en 24 klasoj (hebree *mishmara*; greke *ephemeria*, vd. Lk.1,8) ĉiu el kiuj laŭvice certigis dufoje jare la semajnanan servon krom la festotagan servon. Tiucele plejparte el la sacerdotoj alvenis al Jeruzalemo de la disaj vilaĝoj kie ili kutime vivis.

3.Socihistoriaj aspektoj de la sacerdoteco en Izraelo

En la epoko de la patriarkoj, kiam ankoraŭ ne ekzistis templon nek fakajn sacerdotojn, oni prezentas Abrahamon, Isaakon kaj Jakobon dum ilia strebo konstrui altarojn (Gen.12,7; 13, 18; 26, 25) kaj oferdoni buĉadojn (Gen. 22; 310,54; 46,1) ekzercante formon de familia sacerdoteco⁴.

La izraela sacerdoteco aperas kiam konstituigas la popolo de la interligo en la dezerto (El. 6, 7; Lev.26, 12). Ekde tiam la sacerdoteco havos heredan karakterizon. Nur kun Moseo la tribo de Levi estas elektita kaj benita de Dio por Lia servado, post la unua popola apostateco en la dezerto. (Vd. El. 32, 25-29).

Sub la davida regado la sacerdota kasto fariĝis organizita institucio, aparte en Jeruzalemo, ĉar Davido transportas tien la keston de l’interligo, kaj igas la urbon kvazaŭ la centra punkto por la

³ “Kio povas esti surpriziga por la moderna leganto estas la manko de preĝoj en ĉiuj partoj de la ceremonio. La sacerdotoj ĉe la altaro ne preĝis.... La ofero de la buĉado estis kulta rito kaj kiel ĉiuj tiuspecaj agoj, ĝi estis memsufiĉa”.

⁴ En la epoko de la patriarkoj la sacerdotoj kiujn oni rememoras estas fremdaj sacerdotoj: Melkicedek, sacerdoto el Jeruzalemo kaj la sacerdotoj de la Faraono. Antaŭ la eliro estas la ĉefo de la familio kiu oferas la buĉadojn kaj vokas la benon sur la gefiloj kaj gvidas la diservojn dum la hejma kulto, poste, iom post iom oni vidas la supreniron de levidoj kiel fakuloj pri la kulto (vd. Juĝ.17-18).

izraela kulto. Tamen la reĝo daŭre havos iujn sacerdotaĵajn taskojn kiel la oferon de la buĉadoj (I Sam. 13, 9) kaj la benon de la popolo (2 Sam. 1,18; 1Reĝ. 8, 14), restante tiel la ĉefo de la sacerdota kasto⁵.

Pere de la Josua modifo, kiu komencis cirkaŭ la 622an a.K. la kadro de la sacerdotoj estos nur ligita al la templo de Jeruzalemo, la ununura loko de la buĉofera kulto kaj centro de la izraela vivo en ĉiuj siaj flankoj, kaj politikaj, kaj soci-religiaj. Tia koncentrado de la kulto en Jeruzalemo igis la sacerdotan kaston firman unuigon.

Se dum la periodo antaŭ la ekzilo la sacerdoto estis kulta funkciulo apud la aliaj, post la reveno el Babilono sia rolo fariĝas pli grava kaj evoluas kreskanta hierarkia organizo je kies pinto lokiĝas la Ĉefsacerdoto. La pastreco en Izraelo ekzistas por faciligi la plenumon de la ritaĵo, kies centra socia funkcio estas sekurigi la vivtenadon kaj la materian bonfarton de la popolo. Unu el la rimedoj por garantii tian bonfarton estas la buĉofero⁶, kies ekskluziva kontrolado fare de la sacerdota kasto transformiĝis en ruza armilo pri povo kaj ekonomia (oferdonadoj) kaj spirita (pardonado de la pekoj). Al tiu aldoniĝis la tasko konservi, transdoni kaj instrui la Leĝon (vd. Read. 31, 9-13; Jer. 18,18).

La izraelidoj iris al la templo ankaŭ por konsulti Yahvèon kaj pro tio unu el la taskoj de la sacerdotoj estis **fari profetaĵojn**, uzante tipon de kubo (*urim* kaj *tummim*) per kiuj ili respondis jese aŭ nee al la konsultado (vd. Read. 33,8 ; I Sam. 14,41). Tiu ĉi procedo malaperos kune kun la rekonstruo de la templo post la reveno el ekzilo kaj la profetaĵo estos nur afero por la profetoj, kiuj sin prezentas kiel la “homoj de la Vorto”, dum la sacerdotoj restas “homoj de la Torao”, gardantoj kaj interpretistoj de la religia scienco, kun iom da jura kompetenteco (vd. Readm. 21, 1-9). Tamen la sacerdotoj ne plu rolis kiel predikistoj kiu fariĝos tasko nur de la skribistoj.

Antaŭ la eksilo eĉ la Torao apartenas al sacerdoto kiu ĝin instruas kaj zorgas pri ĝia observado; ĉar ĝi estas konfidata al li ĝi restas limigita al la templo kaj el la leĝaro oni eltiras sistemon da religiaj konceptoj kiu certigas fortan socian kontrolon, aparte rilate la geedziĝo (por eviti, tiamaniere, ĉiun malvirtan seksan sintenon) pere de rigoraj normoj pri pureco. Post la reveno el ekzilo estos la skribistoj kiuj iom post iom anstataŭos la sacerdotojn en tiu ĉi tasko, kaj oni povas konstati laŭgradan perdon de iu ĉefaj roloj de la sacerdoteco, kiel la konsultadon de orakloj kaj la instruadon de la Leĝo, dum tiu ĉi lasta tendencas koncentriĝi en la strikte liturgia- sanktofera kadro⁷ Pro tio la unuatempa tasko de la sacerdotaro estis **la servo ĉe la sanktejo**, pro kio la sacerdoto pli ol “peranto” estas “servisto” de la diaĵo. Nur la benitaj homoj kiuj apartenis al tribo de Levi aŭ devenantaj el Aaron povis proksimiĝi al la altaro kaj oferedoni al Dio la buĉadon. La sanktofera kulto evoluiĝos iom post iom al “puna repagado” pro la pekoj en la tago de la Pekliberigon (vd. Lev. 16), kiu fariĝos antonomazie la kultfesto⁸.

Krom la aspektoj ĝis nun pritraktitaj oni devas konsideri ankaŭ tiujn kiuj rilatas la terminologion, la kaston kaj la normojn pri pureco.

a) Pri la terminologio

⁵ Por la popoloj cirkaŭantaj Izraelon la sacerdota tasko apartenas precipe al reĝo helpata de sacerdotoj, kiuj estis hierarkie dividitaj kvazaŭ vera kasto.

⁶ Kompreneble en la centro de la institucio de la templo estis la buĉofera kulto. Eĉ se la templo havis altan simbolan signifon kiel loko de la dia ĉeesto (*shekinah*) kaj kiel centro de la mondo el kiu ĝi estas ankaŭ bildo, ĝia kerno ĉiukaze estis la materia farado de la buĉofero.

⁷ Malgraŭ la dirmaniero de Bickerman, kiu difinas la sacerdotojn kiel “bonegaj buĉistoj”, tiuj ĉi povis havi bazan kuracistan konon, tiel kiel konon pri flaŭro kaj faŭno por kontroli la observon de la normoj pri pureco, kaj ili devis eĉ havi nociojn pri astronomio por difini la kalendaron (almenaŭ flanke de strikta grupo da ili, vd. Lev. 23, 1-14).

⁸ En la sacerdota dokumento (Lev. 16) la sanktoferoj pro la pekoj eksuperas la sanktoferojn je komuneco, aparte en la tago de la Pekliberigo la temo de la peko aperas kun la tuta ĝia forto. Iom post iom okazas malfortigo de la sacerdota rolo kaj de ties tasko.

La hebrea vorto *kohen*⁹kaj ĝia samsignifa greka vorto *iereus* (sacerdoto) indikas la ŝarĝiton je la kulto ĉe la sanktejo, kies taskoj povis esti malsamaj: fari profetaĵojn, oferi buĉadojn, plorkanti, fari ekzorcaĵojn. La ĉefa tasko de la sacerdote estis la ofero de la buĉadoj, kiuj iam ne estis tasko nur lia sed ankaŭ de la reĝoj de ties filoj, de la ĉeftribanoj kaj de la familiestroj, kaj tiuj buĉadoj devis disvolviĝi laŭ fiksitaj reguloj celantaj protekti la “sanktecon” kaj la “purecon” de la sacerdote. Tia sistemo de disdivido kaj de perfektigo daŭros en la skisma sperto de la Esenoj en la dezerto.

Kune kun la sacerdote oni devas konsideri la levidon, tiu estas vorto kiu funkcias kiel unuaranga kaj nespecifa por la sacerdotoj, ĉar ĉiuj sacerdotoj, teorie, devenis el Levi. Post la reveno el ekzilo la vorto “levido” akiras pli limigitan karakteron kaj ĝi indikas kategorion de “*clerus minor*” (malpli alta sacerdoteco) kun subordita tasko. La tasko de la levido estis akompani la kulton per muziko kaj kantado, gardadon de la enirpordoj krom la prizorgo de la purigo ksj la kontrolon de la sekureco en la templo.

b) Pri la centreco de la sacerdota kasto

La privilegia kondiĉo de la sacerdoteco devenis el la fakto ke ĝi estis fermita rondo, sankta klaso kie nur la posteuloj de Aron povis diservi en la templo (hereda sacerdoteco) Ĉar la civila vivo en ĉiuj siaj flankoj estis ligita al la religia kulto, la graveco de la sacerdoteco kreskos laŭ maniero ĉiam pli evidenta. Por konservi tiun ĉi sacerdotan rangon la sacerdotoj devis sin teni ĉe precizaj normoj, kiel edziĝi al virga knabino kaj, aparte, ili devis sin deteni de ĉiu ajn kontakto kun kadavro, ĉar ĝi estis fomto de malpureco. Pro tio ili ne povis eniri domon kie estis mortinto aŭ partopreni al funebraj ceremonioj. Tiu ĉi malpermeso, kiu estis absoluta por la Ĉefsacerdoto, ĉesis por la aliaj nur kaze de morto je tre strikta parenco. Krome la sacerdota sankteco postulis la mankon de ĉiu ajn fizika malperfektaĵo, la malperfektaĵoj kiuj malhelpis la sacerdotecon oni kalkulis laŭnombre je 142. Finfine por praktiki ilian taskon la sacerdotoj devis submetiĝi al sennombraj reguloj pri rita pureco.

La nuligo de la lokaj sanktejoj en Jeruzalemo, kiu estis kaŭzita de la religia modifo fare de Jozjia (VII jarcento a.K.), kaj la koncentrado de la kulto en Jeruzalemo kaŭzis la superregadon de la sacerdoteco en tiu urbo kaj ankaŭ la levidan monopolon, ekante distingi la sacerdotojn disde la levidoj. Post la ekzilo en Babilono oni donis al la sacerdota kasto tute aŭtentikan aŭtonomecon, krom pli grandan aŭtoritaton sur la popolo. La sacerdoteco fariĝis la religia gvidanto de la nacio. Ankaŭ la malapero de la profetado akcentis lian aŭtoritatecon. Oni starigis rigoran sacerdotan hierarkion: ĉe la verto estis la Ĉefsacerdoto, filo de Sadok, kaj posteulo de Aron. Ekde la IV jarcento a.K. la unktado de la Ĉefsacerdoto, kiu fariĝis ĉefo de teokratia sistemo, similis tiun kiu antaŭe oni uzis por la konsekrado de la reĝo¹⁰ Suborde al li troviĝas la sacerdotoj kaj la levidoj.

Dum la regado de Erodo la Granda, la Ĉefsacerdotoj estos elektitaj de la politikaj aŭtoritatoj en la grandaj sacerdotaj familioj, kiuj apartenis al la plej bonstata socia klaso. La sacerdoteco perdis ĝian aŭtonomecon restante subigita al politika povo. Kontraste kun tiu subigo al civila povo, iom post iom elstariĝas en la juda socio la ascendo kaj la aŭtonomeco de la laika farizea movado, kiu ĉiam pli fortigos. La kulto prenos iom post iom pli laikan karakteron, sin turninte cirkaŭ la sinagogoj, domoj por studado kaj preĝado.

- Pri la observado de la reguloj pri pureco.

⁹ “Kiu staras antaŭ Dio por Lin servi ~, el **kwn**, esti ferma, stabila.

¹⁰ Ĝis la 172an a.K. la ĉefsacerdoto devenis el Sadok : post la morto de Onija III, la lasta el tiu ĉi listigo, siaj posteuloj estos elektitaj de la Seleŭkiaj reĝoj kaj poste de la Makabeoj. Kiel ni antaŭe rememoris, la Azmoneoj unuigos en iliaj personoj mem ankaŭ la sacerdotan taskon, altirinte tiamaniere la oponon de la farizeoj kaj kaŭzinte la skismon de la esenoj.

La rigoreco de la sanktofera kulto, kiu baziĝis sur la observado de la kodo pri pureco klariĝas laŭ la ideo de disigo kiu karakterizas la agon de la kreo laŭ la rakonto de Genezo. Dio naskis la tutan kreitaron ordiginte ĥaosan kaj malplenan realon:” *Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo* “ (Gen .1, 2); ĉio tio okazas pere de la “distingo” de malsamaj realaĵoj per kiu Dio sciis reordigi la ĉielon kaj la teron. La krea procezo okazas pere de iom post ioma apartigo (*kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo*”, Gen. 1, 4) kiu kaŭzas la necesan ordon por ĝin efektiviĝi. Dio “apartigis”... pro tio ankaŭ Izraelo devas “apartiĝi” de la paganaj landoj kaj la sacerdotoj devas garantii ke oni apartigu la puraĵon de la malpuraĵo¹¹ La normoj pri pureco, nemalhaveblaj por la bona disvolvo de la kulto, estis la reflektado de la “sacerdota” koncepto de Izraelo, lando “dispartigita” de la aliaj, tia koncepto poste estos subtenata de la fariseoj, la antonomazie “disigitaj”.

En tiu ĉi kunteksto oni komprenas la tutan malpermeson por la virino povi eniri la sacerdotajn taskojn. Pro sia fiziologio la virino, kies ciklika fekundeco kaj naskipovo de nova estaĵo, permesas al ŝi eniri en la misteron de la vivo, kaŭzas tian “malordon” kiu fariĝus la kulto tute ne praktikebla. Al la viro ne eblas eniri la misteron de la vivo, kiu estas povo de la dieco, al li estas permesate nur ĝin submeti, sin klini antaŭ ĝi aŭ ĝin kontempli. Male, la virino posedas tiun privilegion, kvankam nur laŭokaze kaj tute esceptokaze: en ŝi troviĝas la necesaj kondiĉoj por la gravedeco; transpasinte la limojn de sia ebleco la virino ne respektas tian apartaĵon per kiu Dio garantiis la kreaĵon ordon. Pro tio la virino ne nur ne povas fari sacerdotajn taskojn (en la hebrea lingvo la termino **kohen** ekzistas nur en vira formo), sed ŝi estas formetita el la kulta vivo ĉiufoje kiam okazas tia kontakto kun la mistero de la vivo: kaj post la menstruo (dum sep tagoj ŝi restos malpura, vd. Lev. 15,19) kaj post la nasko (dum kvardek tagoj ŝi malpuros se ŝi naskas filon/ dum okdek tagoj se kontraŭe temas pri filino, vd. Lev. 12, 2, 5) kaj poste estos postulataj apartajn purigajn ritaĵojn por restarigi la rompitan ordon kaj permesi al la virino partopreni en la kulto.

4. La kritiko de la profetoj

Ofte la sacerdotoj estis la celo je suspektoj kaj insultegoj, ĉefe flanke de la profetoj, kiuj ilin akuzas pri monavido (vd. Mĥ. 3,11), pri ebrieco (vd. Jes. 28,7), pri neglektemo, pri malklereco (vd. Cef. 3,4), kaj eĉ pri murdo (vd. Hoŝ. 6,9). Ĉar ili estis homoj ligitaj al la tradicio de la pasinteco, malfacile la sacerdotoj povis veni renkonte al la novaj postuloj kaj necesoj de la popolo, krome ilia zorgoplena observemo de ritaĵoj ofte kaŝis la mankon je fideleco en la praktikado de la mizerikordo kaj de la justeco. Estos la profetoj kiuj lanĉos fortan kritikon al iliaj mankoj, kiel bone rememoras Jesaja en la komenco de sia libro, kiam li atakas la kulton en si mem:

“Por kio Mi bezonas vian multegon da buĉoferoj?
 diras la Eternulo;
 Mi trosatiĝis de la bruloferoj de ŝafoj
 kaj de la sebo de grasigitaj brutoj,
 kaj la sangon de bovoj kaj ŝafidoj kaj kaproj Mi ne deziras.
 Kiam vi venas, por aperi antaŭ Mia vizaĝo,
 kiu postulas tion de viaj manoj, ke vi paŝu sur Mian korton?
 Ne plu alportu hipokritajn donacojn;
 la incensado estas abomenindaĵo por Mi;

¹¹ La normoj kiuj regas la vivon de la individuo, kaj laŭ la igieno kaj laŭ la vivtenado kaj la seksumado validas ankaŭ por la izraela lando kiel socia realo,!”disigita” disde la aliaj popoloj (observante normojn kiuj rilatas al landlimoj, naturaj terproduktaĵoj endogamiaj geedziĝoj). La integreco de la landlimoj, ekzemple, devas esti protektata per la sama zorgemo per kiu la reguloj pri pureco protektas la integrecon de la fizika homa korpo (vd. Lev.18,25.; 20, 22)

monatkomencon, sabaton, kaj kunvokon de kunvenoj Mi ne toleras Viajn monatkomencojn kaj festojn Mia animo malamas; ili fariĝis por mi ŝarĝo, tedis al Mi porti ilin. Kiam vi etendas viajn manojn, Mi kaŝas antaŭ vi Miajn okulojn; eĉ kiam vi multe preĝas, Mi ne aŭskultas; viaj manoj estas plenaj de sango...”(Jes. 1, 11-15)

En la deklaro de la profeto ĉiu kulta ritaĵo estas taksata per negativa noto :*Mi ne deziras/tedis al mi/ Mi trosatiĝis/ malplena/abomenindaĵo/ Mi malamas/ Mi kaŝas antaŭ vi Miajn okulojn/ Mi ne aŭskultas.* Por Jesaja la abundo de religiaj ritaĵoj estas signo je nekredemo.

Pro la diverstipaj ritaĵoj mastrumataj de la sacerdotoj (brulofero/oferceremonio/ penta ofero/ dankofero) la akuzo de la profetoj estos ke ne eblas akcepti iun ajn kultaĵon al Dio kiu estu dispartigita disde la vivo aŭ kiu ne estu esprimo de la justeco. Pere de la buĉfero oni volis rekoni la regadon de Dio al kiu oni ŝuldas submetigon, sed tia rekono, ofte, ne kondukis al respekto de la libero kaj de la digno de la homo kiel bildo de Dio. La granda kritiko devenanta el la ĉirkaŭlaro de la profetoj rilatas la ekceson de la kulto kun damaĝo de la vivo¹², maldigniginte, tiamaniere Dion je la nivelo de tiuj diaĵoj kiuj sin lasas klini antaŭ buĉferoj kaj sanktoferoj.

La akuzo direktita kontraŭ la sacerdotoj estas ke ili anstataŭas la justecon perl la kulto. Se rompiĝas la ligo inter la kulto kaj la justeco oni frapas en ĝia koro la fidon de Izraelo (Amo. 9, 10). Por la profeto la sperto pri Dio, pri lia ĉeesto ne okazas pere de la kulto, eĉ kun siaj mistikaj signoj, sed ĝi okazas pere de la konkreta amo, praktikante la justecon kaj la juron (Amo.5, 4-15). La bondeziro de la sacerdoto kiu forsalutas la fidelulojn ĉe la fino de la kulto per la vortoj “**Dio estos kun vi**” ne efikas en si mem, oni ne povas sperti la diecon sen serĉi la bonon de la aliulo, celante la mizerikordon anstataŭ la sanktoferon, kiel proponas Hoŝea (Hoŝ. 6,6). Sen tiu ĉi premiso la ritaĵo fariĝas farso. Nur la vivo kiu sin malfermas al aliulo povas doni konsiston al kulto kiel esprimo de tio kion oni vivas en la homaj rilatoj.

* La novaĵo de la Nova Testamento.

La peco de Eliro 19,5, kie Dio promesas al Izraelo ke ĝi estos “sacerdota regno”, estos aplikata en la Nova Testamento al la komunumo de la kredantoj (vd. I Petro 2, 5-9; Apok. 1,6; 5,10; 20,6) . Okaze de la interligo sur la monto Sinajo la popolo ricevis la promeson flanke de Dio eniri en strikta proksimeco al Li, laŭ la senco ke la izraelidoj estos ricevintaj la reĝan kaj sacerdotan dignojn:

La promeso de Dio rilatadis la tutan popolon:

“Kaj Moseo supreniris al Dio; kaj la Eternulo vokis al li de la monto, dirante: Tiel diru al la domo de Jakob kaj sciigu al la filoj de Izrael: Vi vidis, kion Mi faris al la Egiptoj kaj kiel Mi portis vin sur aglaj flugiloj kaj venigis vin al Mi. Kaj nun se vi obeos Mian voĉon kaj observos Mian interligon, vi estos Mia amata propraĵo inter ĉiuj popoloj, ĉar al Mi apartenas la tuta tero. Kaj vi estos por Mi regno de pastroj kaj popolo sankta. Tio estas la vortoj, kiujn vi diru al la Izraelidoj.” (El. 19, 3-6).

La interligo de la monto Sinajo lokiĝas en tiu kiu povas esti konsiderata la plej grava etapo en la itinero de la izraelidoj ĝis la promesita lando. El tiu ĉi interligo fontas Izraelo kiel tia kaj la

¹² En la Evangelio laŭ Sankta Luko, Johano la Baptisto, filo de la sacerdoto Zeĥarija, estas metita en la dezerto kaj ne en la templo por inviti la popolon al konvertiĝo (Lk.3, 2-3). Sankta Johano eĉ se li estas tia, li ne agas kiel sacerdoto sed kiel profeto: li sugestas bapton por la pardono de la pekoj, rompante tiamaniere la kultan ritaĵon de la jeruzalema templo. Kaj kiam la homamaso sin turnas al li petante lin pri la fendaĵo (Lk. 3,10) lia respondo ne rilatas la religian kaj kultan kutimon (preĝado, sanktoferoj, humiligoj) sed tiun pri socia justeco: kundividado/ honesteco/ bonvolemo (Lk.3, 11-14).

digno de siaj loĝantoj: reĝa, sacerdota kaj sankta popolo (El. 19, 4). Tamen tiu ĉi digno estas kondiĉita de la observado de la Leĝo. Tio kio por la popolo de Izraelo, laŭ la libro Eliro, restis promeso, en la Apokalipso fariĝas realaĵo por la homoj kiuj apartenas al la kristana komunumo. Tri fojojn Sankta Johano aludas pri El. 19, 5, rekonfirmante la dignon je tiuj kiuj donas sian konsenton al Kristo- Ŝafido. La vortoj eldiritaj de Dio sur la monto Sinajo pri la sorto rezervita al Izraelo, nun trovas sian plenan efektivigon en la atesto donita de Kristo, ĉar la promeso ne plu rilatas unu apartan popolon, nek oni ĝin atingas praktikante normaror, sed oni ĝin atingas danke al sia amo al la tuta homaro:

“Al tiu, kiu nin amas, kaj nin malligis de niaj pekoj per sia sango, kaj faris nin **regno, pastroj** al lia Dio kaj Patro; al li la gloro kaj la potenco por ĉiam kaj eterne. Amen”. (Apo. 1, 6)

“Ili kantis novan kanton, dirante: Vi estas inda preni la libron kaj malfermi ĝiajn sigelojn; ĉar vi estis mortigita, kaj vi elaĉetis al Dio per via sango homojn el ĉiu tribo kaj lingvo kaj popolo kaj nacio, kaj faris ilin al nia Dio **regno kaj pastroj**; kaj ili reĝas sur la tero” ili kantis novan kanton, dirante: Vi estas inda preni la libron kaj malfermi ĝiajn sigelojn; ĉar vi estis mortigita, kaj vi elaĉetis al Dio per via sango homojn el ĉiu tribo kaj lingvo kaj popolo kaj nacio, 10 kaj faris ilin al nia Dio regno kaj pastroj; kaj ili reĝas sur la tero.” (Apo. 5. 9-10)

“Feliĉa kaj sankta estas la partoprenanto en la unua releviĝo; super tiuj la dua morto havas nenian aŭtoritaton; sed ili estos **pastroj de Dio kaj de Kristo, kaj reĝos** kun li mil jarojn”. (Apo. 20.6)

Por Sankta Johano la esprimo “li faris nin regno” rilatas la novan interligon fiksitan de Kristo pere de la oferado de Sia vivo; la liberiga agado favore de la homoj, kiuj ricevas la reĝan kaj sacerdotan dignon pere de Lia senkondiĉa amo estas memorigita ĉerpante inspiron el El. 19, 6. Tio signifas ke la distingaj trajtoj de la kredantoj, kiel tiuj pri la “reĝeco” kaj pri la “sacerdoteco”, ne plu dependas de la observo de la Leĝo, sed de la akcepto de la amo de Dio kiu manifestiĝis en la persono de la Kristo¹³

La relegado de El. 19,6 kiun faras la verkinto de Apokalipso trovas ĝian bazon en la instruado de Jesuo, kies novaĵo implicas la disfaligon ne nur de tiaj baroj kiuj disigis la sacerdotan kaston de Izraelo disde la ceteraj komunaj homoj, sed ankaŭ de tiuj baroj starigitaj de la religia tradicio por limigi la puraĵon kaj la malpuraĵon. En la rakonto de la naskiĝo de Jesuo, laŭ Sankta Mateo, la omaĝo de la tri maĝoj venintaj el Oriento estas priskribita tiel ke oni elmontru la superadon de ĉiuspecaj soci-religiaj diskriminacioj: enirante la domon la paganuloj “ vidis la knabeton kun lia patrino Maria, kaj adorkliniĝis al li; kaj malferminte siajn trezorojn, ili faligis sin kaj prezentis al li donacojn: oron kaj incenson kaj mirhon”.(Mt. 2,11). Por la ago de la prezento de la donacoj la evangeliisto uzas la latinan verbon **profero**, kiu estas teknika termino kiu en la Malnova Testamento signifas “oferdoni” kaj ĝi estas ĉiam evitita kiam la oferdonantoj estas la paganuloj (vd.Psal. 72, 10). Per la elekto de tiu ĉi termino Sankta Mateo prezentas la paganulojn, la pekulojn antonomazie, dum ili oferdonas al la “reĝo de la Judoj” siajn donacojn: oron, incenson kaj mirhon. La riĉa simbolismo de tiuj ĉi tri aĵoj¹⁴kiuj en la kutimo de Izraelo indikis la kondiĉon de reĝa, sacerdota kaj edziĝinta popolo, ĉi tie Sankta Mateo ĝin atribuas al la paganuloj por konfirmi

¹³ La libro Apokalipso atribuas la “reĝan sacerdoteco” de Izraelo al la komunumo de la kredantoj, kiu konsistas el homoj devenantaj de ĉiu popolo, nacio, lingvo kaj tribo (vd.Apok. 5,9; 7,9; 13,7; 14,6). La promeso pri sacerdoteco kiu kuntrenadas la tutan popolon konkretiĝas nun en homa realo kiu, pligardante sian fidelecon al Kristo, ne sin submetas al religiaj normoj kaj ordonoj sed enkorpiĝas en si mem la vivon de Dio.

¹⁴ En la biblia simbolaro la **oro** rememoras la reĝecon, la **incenso** rememoras la kultan praktikadon kaj la **mirhao** rememoras la geedziĝan rilaton. La fakto ke, en la evangelio de la infanaĝo laŭ Sankta Mateo, paganuloj oferdonas al infaneto “reĝo de la Judoj” tiujn ĉi donacojn signifas ke lia reĝeco estas universala, tiel kel ĉiuj povas doni al li kulton de li favore akceptata (vd. Lev. 2; Jer. 6, 20) kaj starigi kun Li rilaton je plej granda intimeco kaj komuneco.

ilian partoprenon en la sama digno de la popolo de la interligo sed sen devi sin submeti al la leĝaro de Moseo.

- **Konkludo:**

Per la kapitulaco de Jeruzalemo kaj la detruado de la templo en la jaro 70a p.K., la sanktofera kulto malaperas kaj la sacerdota kasto perdas sian superan rolon en la juda medio. La sacerdoteco fariĝas honortasko sen iu ajn speco de regado, de perado aŭ de mastrumado je la religia praktiko, kiu estas strikte ligata al la laika kadro de la Sinagogo.

La fino de religia institucio kiel tia de la sacerdoteco, kiu karakterizis la historion de la izraela popolo ekde lia komenco, estas paradokse akompanata de la realigo de tiu dia plano kiu permesadis la plenan komuneco inter Dio kaj la homaro. La graveco de la vortoj de El. 19,6, kie la reĝa kaj sacerdota digno estis promesitaj al la izraelidoj en la dezerto, estas abunde superata en la persono de Kristo, ĉar ili ne plu estos limigitaj al aparta etno sed ili etendiĝos al ĉiuj homoj. Tiuj kiuj sin malfermas al la senkondiĉa amo de la Patro kaj kapablas ĝin transdoni kiel faras la samariano en la parabolo de Sankta Luko, tiuj vere kultas Lin laŭ la maniero kiun Li ŝatas (vd. Joh. 4, 23).

Fr. Ricardo Pérez Márquez
Centro pri Bibliaj Studoj "G. Vannucci"
Montefano (Mc)

